# Festo - 2006
## Kastela viv'



## Kongreslibro


# Bonvenon en nia Kastel !

# Ĝoju, dancu, festu sed ne destru la meblojn bonvolu !

## Teamo

**Ĉeforganizanto :** Cyrille Poullet - **Kasisto :** Julia
**Prezidento de Jefo kaj Ĉefkuiristo de Festo :**Axel Rousseau
**Vizoj/invitleteroj :** Emanuel Villalta - **Programo :** Aleks Kadar
**Koncertoj kaj Eurokka respondulo :** Flo Martorel
**Dumnokta programo :** Melono - **Interreto :** Emanuelle Richard

## ...Kaj Ben kompreneble, "Drinkaĵo?"



Aperitivojn, trinkaĵojn, drinkaĵojn, diboĉilojn, ĉion ĉi vi trovos en la trinkejo, ĉe kiu vi povos proviziĝi je vesperumadbenzino sed ankaŭ diskuti kun la trinkejestro, masaĝi la trinkejestron, flatlogi la trinkejestron por havi senpagan trinkaĵon kaj ĉio tia.

**Ben**

## Tuttaga ekskurso - Malkovru Anĝevon
Mardo la 22a, tuttage


Guillaume Savaton

La vizito komenciĝos apud la kastelo de Angers. Dum la mateno ni proponas al vi paŝadon tra la malnova urbo ĝis la katedralo kaj la moderna urbocentro. Tie videblos rimarkindaj monumentoj kaj konstruaĵoj, ekzemple la « Maison d'Adam » (Domo de Adamo) kaj la Granda Teatro. Tiuj, kiuj ŝatas muzeojn trovos vidindajn artaĵojn en la Muzeo Pincé (objektoj el la antikva periodo), la muzeo David d'Angers (skulptaĵoj), la « Musée des Beaux-Arts » (belarta muzeo, pintraĵoj) kaj la muzeo Jean Lurçat (modernaj tapetaĵoj
).

Je 12:00, ni kunigos sur la kajo Eric Tabarly, ĉe la rivero Maine, por kunmanĝi. Posttagmeze, ni paŝos tra la « Parc de Balzac » ĝis la « Lac de Maine ».

Tiu lago estas fama ejo, kie Anĝevanoj praktikas kuradon, velŝipadon, veltabuladon kaj kajakadon. Parto de la lago estas aranĝita kiel banejo. Tie ni pasigos la finon de la posttagmezo. Ne forgesu vian bankostumon !

**Horaro :**
9:00 - Enbusigo kaj veturado de Grezijono al Angers
10:00-12:00 - Vizito de la urbocentro
12:00-13:00 - Manĝo
13:00-17:00 - « Parc de Balzac » kaj « Lac de Maine »
17:00 - Enbusiĝo kaj reiro al Grezijono



## Danco de la ventro
*Posttagmeze – Dum la tuta semajno*

La revo de ĉiu virino - esti bela kaj alloga. La vojo tion atingi estis konata en la Oriento de antika epoko, kie aperis DANCO DE VENTRO. Ĝi estas magia danco de amo, de beleco kaj ĝojo! DANCO DE VENTRO helpas kompreni la esencon de vivo kaj konservi la ĉarmon de juneco por multaj jaroj! Ĉu ni dancu?!

**Juljia Bajborodina** (Юля Байбородина)

## Lingva Interpretado (LPLL)

*Lunde prezentado kaj dum la tuta semajno*

*"Estas rajto de ĉiu homosin esprimi estante kom-prenata kajkompreni tion, kion oni al li au ŝi diras, per lingvo de la propra gento au regno, estas rajto de ĉiu gento kaj de ĉiu regno libere uzadi sian propran lingvon" Tiel sin prezentas la asocio.*

Staĝo de intepretado estos kion proponos al vi. Fransisko Simonet, kiu multe pretikis tiujn ekzerco dum lia multnombra vojaĝo.

## Filmfarado [Henrri] *Matene – Dum la tuta semajno*

Skribu senarion. Prenu kameraon. Kreu filmartaĵon.

## <u>Assemblée générale de Jefo</u> – *Samedi 26, l'après midi*

L'association Espéranto-Jeunes (qui organise Festo) te propose de participer à son assemblé générale. Thème abordé :

- Budget, eléction du comité
- Vote du rapport moral: déscription des actions réalisés
- Actions futurs (BDs, Stands, T-Shirt etc..)



## Ŝpurludo

*Vendredo - Matene – En urbo de Baugé*

Ĉu vi volas ekkoni la urbon alimaniere au simple ekkoni ĝin? Ĉu vi volas promeni kun esperantistoj en luda etoso? Tiam partoprenu la ŝpurludon okazontan.... Ne forgesu kunporti parperon kaj skribilon, eble utilos!!

**Fabien Tschudy**

## Teatraĵo: Sen lifto



Kiam Sinjoro 1 renkontas Sinjoron 2, ili kompreneble parolas pri gesinjoroj. Ili forgesas paroli pri la vetero; la hieraŭa televidfilmo estas multe pli interesa. Senĉese ili babilas por malkovri unu la alian, por pli klare vidi aŭ por lerni kiel krii kontraŭ la virinoj.

- Krii kontraŭ la virinoj ?
- Bah, jes... por komenci... Estas pli facile krii.
- Ĉu estas pli facile krii ol paroli?
- Kompreneble!

Tio kion eblas kompreni estas la idioteco de tiuj dialogoj. La originaleco de la libro estas ke estas nenio originala. Ankoraŭ neniu faris tion ĝis nun!

Tio estas grandega, respondis s-ro 2, mi jam emas legi vian libron.

## Granda Balo, *ĵaŭde vespere*

« ĉi-vespere estos mi la plej bela por danci .. danci.. la la la la la »

Akompanos por la ĵaz-muziko nia melono. Preparu vian belan kostumon… Estos tempo por Fest-umi (denove?)

### Internacia Vespero *Sabate, vespere kompreneble…*

Estos tempo por proponi vian programon… Faru ne tro longa kaj bona !

## demexp

*Merkedo la 23a – 16h-17h30*

Mi vivas en demokratia lando. Per voĉdono mi mem decidas pri la leĝoj en mia lando » : tion certe dirus multegaj homoj. Ĉu prave ?

Ĉu la voĉdonsistemoj uzataj en « demokratiaj » landoj vere estas tiaj ? Kiel funkcias tiuj voĉdonsistemoj ? Ĉu vere vi havas elekton ? Ĉu vere estas elektata la kandidato/propono, kiuj plej plaĉas al plej multaj homoj ?

Antaŭ 4 jaroj, iuj francaj studentoj ekis ambician projekton « DEMEXP » (EKSPerimenta DEMokratio) : malkovru kiel eblus vere partopreni

demokration, kiel la popolo povus rekte decidi pri leĝoj, kiel la voĉdonsistemo « Condorcet » elpensita dum mezepoko pli bonas ol aliaj nuntempe uzataj, kaj kiel tiu sistemo povus ekuziĝi tre rapide kaj sendolore, eĉ sen revolucio.

Ankau interesa ĝi estas por helpi al E-asociaj decidoj !
E-lingva priskribo legeblas ĉe http://demexp.org .

**Sebastien Montagne**

## Pri Rumanio – *Lunde la 21a, matene*



**E-Movado en Rumanio**
*(10 minutoj)* Florica proponos priskio kaj parolado pri la E-Movado en en Rumanio
**Timisoara : Filmeto**
Filmeton pri mia urbo, Timisoara, kun la komentoj.

**Rumanajn popolkantoj** *(10-15'), Vespere au nokte*
Rumanajn popolkantoj el diversaj zonoj de la lando

## Kore (Francio) *– Sabato 26a*

La plej melodia pop-grupo en Esperantio, revenas. La stilo estos pli popa, sed ankaŭ la nostalgiuloj de la unua Kore-periodo havos belajn surprizojn.

Ili ludis antaŭ mallonga tempo en la kongreso de UFE (Union Française pour L'Espéranto) lasta aprilo. Surpizigis kaj ĉarmis la publiko per bonkvalita dolĉaj muziko.

## Duoble Unu (Fancio)



*Merkrede 25a kaj Vendrede 25a*

Finfine Duoble Unue partoprenas la Festo-n renkontiĝo. Ni havos dufoje eblecon vidi ilin. Estas Unua eblecon vidi ilin kune kun Famo kaj dua foje sole. Ili proponos al ni "muzikvojaĝo tra la mondo, kun ĉirkaù 16 lingvoj kantataj"…

## Folko: Famo (Francio) *Merkrede 25a*



FAMo, al mi la hazardo donacis tiujn silabojn kiel la unuajn de miaj persona kaj famila nomoj. Poste mi ricevis ankaux pli malpli hazarde kaj donace muzikstudojn, akordionon, sufi ĉe por donaci miavice, al vi, se donacojn vi ŝatas, mi proponas dividi iom de mia intimeco, per kelkaj el miaj kantoj kaj interpretoj el aliies kantoj.

## Rep: PafKlik (Francio) *Vendrede 25a*



Unua el multnombraj artistoj kiu estos cxe la venonta Hiphopa Kompilo ! Dum la komenciĝo de la Pafklik', la anoj iufoje ne povis repi pro biero kaj malseriozeco sed ili poste decidis ĉion detrui, «precipe tiun feklingvon : Esperanto», aldonas Katakana malfermanta sian bieron. Pardonu ilin, ili estas el strato.. PafKlik estas vivanta pruvo ke Rep bone sonas en esperanto !

## Ĵazo: Melono (Francio) *Ĵaŭde 24a*

Juna sed jam sperta ! Ĉar Melono multe koncertumis en sur pariza scenejo.. Li denove improvizmaniere ludos klavaron sed ĉi-foje por vi ! Ke oni sxatas aŭ ne Ĵazon nur povas admiri lian arton.




## Spiritismo [Bertrand] – *dato? xxa*



La celo de tiu prelego estas enkonduki al vi nociojn pri senmorteco de la animo, celo de la vivo, senco de la doloro, karma leĝo, kaj aliaj interesaj aferoj laŭ la vidpunkto de la spiritisma doktrino. La preleganto Bertrand Hugon estis ano dum unu jaro en spiritisma klubo en Dunkirko, kie li tiam instruis matematikon. Li jam faris prelegojn tiutemajn en IS, IJK kaj FESTO. Cetere la programero havos la saman strukturon kiel pasintfoje: du trione silenta enkonduko, prelega parto kun demandoj el la publiko, kaj ech eble mediuma parolado!

## Ĉu baldaŭ Esperantista prezidento en Francio?

***Esperanto Libereco* [Bertrand]**– *Sabate 26a*



Esperantisto provas akumuli la 500 subskribojn por oficiale kandidatiĝi en la prezidentaj balotoj francaj de 2007. Lia nomo estas Kristian Garino, estas li, kiu en lanĉis en 2004 la partion Europo Demokratio Esperanto en la europaj balotoj. Nun kun la movado Esperanto Libereco la celo estas denove atentigi la ĝeneralan publikon francan pri la neceso okupiĝi pri neŭtrala esprimilo komuna se ni volas konstrui Europon demokratan. La prelegonto, Bertrand Hugon estis unu el la sep oficialaj fondintoj de EDE kaj li provos informi vin kiel eble plej detale pri tio, kio okazos en 2007 !